



ВИДИНЪ ВМЪСТО ЛОМЪ

Поради причини, основаващи се на Закона отъ Министерството на Вътр. Работи се отказа утвърдяването устава на Еспер. Д-во въ Ломъ. Отъ друга страна поради стекли се обстоятелства нѣкои есперантисти отъ Ломъ се отказватъ и отъ активна дейность. Въпрѣки, че се направиха постѣпки за уяснение положението — въ Съюза се получи официаленъ отговоръ такъвъ, какъвто се очакваше.

Вземайки всичко предвидъ и изхождайки отъ гледна точка на тактичносттата Ц. К. въ заседанието си отъ 27 Априль н. год. рѣши тазгодишния конгресъ да бжде въ **ВИДИНЪ**. Това рѣшение се сходя и съ желанието на миналогодишния конгресъ.

Конгреса ще се състои на 28, 29 и 30 Юлий.

Всичко отнасящо се до конгреса да се изпраща на адресъ: Владимиръ Лазаровъ, I сѣдия изпълнителъ — Видинъ.

Гответе се за Видинъ.



Vidin kongresurbo de nia XVI-a.

„Baba Vida“ — antikva fortikaĵo.

Miljara kaj kvindekjara jubileaj memorfestoj en Bulgarujo

Kliŝo de Bългар-
ska Istoricheska Bi-
lio eka



Pentraĵo de Simeon
Velkov - profesoro
de la Akademio de
l' Artoj.

Reĝo Simeono la Granda

La 12 — 15 de Majo Bulgarujo kaj ĝia popolo festis solene la 1000 jaran datrevenon de la ora bulgara epoko de Simeono la Granda — bulgara reĝo fama per regadtempo pro politikaj kaj kulturaj progresoj, kaj 50 jardatrevenon de post la liberiĝo de Bulgarujo el la turka 5 centjara jugo. Precipe la unua festo estas citata ĉisube konscize el la bulgara historio, kies epoko estas dividita en tri regadperiodoj.

La unua datumas ekde la kreo de la regno de reĝo Asparuh dum 679 j. p. Kristo. Tiu periodo estas glora pro la rapidaj antaŭiroj ĉiurilate, daŭranta ĝis la dekadenco - 1018 j., kiam Bulgarujo falis sub la jugon de Bizantio. La katenoj de la premado estis intepromptaj de la du fratoj Aseno kaj Petro en Tirnovo dum 1186 j. proklamintaj la libereco de la bulgara popolo.

Dum dua periodo multaj reĝoj regis; multaj internaj bataladoj rezultigis malforteco de la ŝtato, ĝermis novaj malgrandaj ŝtatoj, kies unueco sur nefortika reciprokeco kaj miskomprenoj kaŭzis la invadon de la turkoj el Azio. En 1393 j. la tuta bulgara popolo estis sklavigita. La premado de la turkoj daŭris 5 jarcentojn.

Kaj la tria periodo komenciĝis de post 1878, dank' al la rusa imperio kiu reliberigis la bulgaran popolon.

La 1000 jardatreveno rememorigis al la bulgara popolo, ties oran epokon je ambicioj por politika unuiĝo de la bulgara gento kaj kultura altigo de la bulgara literaturo je panteono de l' bulgaraj reĝoj - Simeono la Granda. Li estas filo de reĝo Boris I-a dum kies regado okazis la kristaniĝo de la bulgaroj. La epoko de Simeono famiĝis pro liaj militaj kapabloj. Li sukcese

ĝisatingis Konstantinoplon, Salonikon, lia regno vaste etendiĝis de l' Danubo, Nigra Maro ĝis Adriatika Maro.

La kortego estis loko de la bulgaraj intelektuloj. Verkistoj volumojn verkis originale kaj tradukaĵojn el la greka lingvo.

Miljaroj post tiu epoko Bulgarujo prezentas malgrandan ŝtaton unuigantan nur parton de la bulgara gento. 50 jaroj post la 5 jarcenta fremdŝtata premado Bulgarujo estas libera, demonstranta la liberecon.

La festloko estis la iama dum la unua regadperiodo ĉefurbo Preslav. La ŝtato bonege organizis ĉi memorfestojn per eksterordinaraj ceremonioj kaj ankaŭ la reĝo Boris III-a, la ministrojn kaj multaj organizacioj, institucioj partoprenis. La 12-an de majo oni diservis, bruligis la sanktan fajron kaj forportis la sportuloj la du brulantajn torĉojn al la reĝodomo en Sofio, al Ruse Varna k. a.

En la tuta lando oni festis ĉi rememorindajn datojn de l' bulgara historia disvolviĝo tre solene. Tiaokaze la ŝtato eldonis jubileajn poŝtmarkojn kun la bildo de la Apostoloj por la libereco de Bulgarujo kaj ĝia liberiginto la rusa imperiestro Aleksandro II-a.

Dimitr Ivanov — Ruse.

Maja Himno.

Denoraciaj versoj.

Suno!

Flamanta fajra sun'. —

Radioj!

Mil da diverskoloraj radioj kolorigitaj en purpur'. —

Parfumo!

Ĉarma parfum' el florantaj siringo kaj diantoj, bananta sin en freŝa aer'.

— Majo!

* * *

Super la verda balanciĝanta ter' superŝutita per flavruĝaj krokuso kaj blupalaj hiacintoj —

En la serena vibranta aer', mi sentas vian delikatan spiradon, —
Printemp'!

La kristalaj gutoj de l' petolema arbara torento kantas vian bonvenan himnon.

— Majo! —

* * *

Delikataj arordoj de sin forgesinta najtingalo estingiĝas malproksime, ie en via ornamita sin',

Kaj kantas.

La tero per siaj multkoloraj herboj kaj arboj — bukedoj, balancaj de l' varmeta vent' — la konsonantan simfonion de la Printemp',

— Majo! —

* * *

Tra l' orbrilaj sunaj nuancoj malproksime el sudo mi vidas aperi via fajra ĉaro, tirata de diverskoloraj papilioj, — ornamita per floroj el blankneĝaj lotusoj kaj per verdaj palmaj branĉetoj,

Reĝino de l' vivo

— Printemp'!

Sur delikata tapiŝo el altkreska trifolio — inter bonodorantaj parfumo el sangruĝaj violoj, apoginta sur bukedo el fajraj narcisoj kaj portata sur la flugiloj de milkoloraj papilioj, vi venas

— Majo! —

* * *

La delikataj fibroj de mia flamanta junula Brust' kantas entuziasmajn himnojn pri vi

Reĝino de l' vivo

— Printemp'!

Miaj junulaj brakoj sopiras vin!

La sango estingiĝas en la vejnoj ĉe l' rememoro pri vi, ĉarma,

— Majo! —

* * *

Via orradia vizaĝo lumigu mian palan frunton por mi ekĝoju...

Miaj sensangaj lipoj kunfandiĝu kun viaj fajraj lipoj — sovaĝa skarlata rozo, por mi ekridetu,

Reĝino de l' vivo

— Printemp'!

Mia osteca mano tuŝu vian batantan koron, por mi varmumu,

— Majo! —

* * *

Aŭ... vi senparole pasos preter mi, jetinte al mi bukedon el jam velkintaj floroj kun purpura papavo,

Reĝino de l' vivo

— Printemp'?

Kaj denove orfo, pala kaj malvarma sur mia sklavigita patrujo, por ĉiam kun malgaja rideto sur lipoj, mi vivu,

— Majo! —

* * *

Suno!

Flamanta fajra sun'! —

Radioj!

Mil da diverskoloraj radioj kolorigitaj en purpur'. —

Parfumo!

Ĉarma parfumo el florintaj siringo kaj diantoj, bananta sin en freŝa aer'.

— Majo! —

MAJON 1927.

ST. MASSEROV

Nikolaj Rajnov.

BLANKAJ TENDOJ

Grandaj sablaj montetoj kuŝas kiel mortintoj, kovritaj per polvaj vualoj. Kaj super ili la Suno rompas varmegajn glavojn.

Trapasis vi longegan stepon kun alta herbo, kie

flugkuras sovaĝaj hundoj kaj rapidegas furiozaj ĉevaloj.

Blankaj tendoj staras antaŭ vi kvazaŭ kamelbirdoj kies timema paŝo estas preta surporti ilin malproksimen. Kaj super ili la Ĉielo faldas buntajn tapiŝojn.

Vi trapasis senbordan sablan maron, kie kuradas kamelbirdoj kaj kaŝas sin rabistoj, — por ke vi atingu ĉi tie.

Travideblaj fontoj ŝprucas antaŭ vi — kaj buklofornaj palmmoj levas kapojn, kiel turbanoj de enpessigintaj beduenoj, atendantaj la orajn vortojn de la Profeto.

Vi travagis altajn montojn de Sablo, kie dezertventego turnomovas ruĝajn hararojn kaj pelas danĝerajn blekventojn, — por ke vi atingu ĉi tie.

Sub la palmoj folifaskoj kuŝas kamelistoj. Longajn horojn ili kuŝas super la fontoj, kiel mortintoj: akvon ili trinkas, ĉar tutajn tagojn iliaj ledvezikoj estis malplenaj.

Vi venis vidi la feston de l' Dezerto.

Blankaj tendoj kuŝas antaŭ vi.
Animo via klarigos kiel fonto meze de la oazoj — kaj malŝatos la mondon.

El de tie ĉi vi revenos ĉe viaj proksimuloj — malvarmega kiel stelo de glacio.

Blankaj tendoj kuŝas antaŭ vi.
Samkiel grupoj rondflugas super la oazoj klaraj nuboj, kaj vespere ĉirkaŭ la tendoj — apud la sablaj montoj sternas sin malsekaj nebuloj.

Trans la monto pasas karavano: nigraj makuloj kreskas kaj proksimiĝas. La kameloj malrapide kaj lace alpaŝas kaj balancas longajn kolojn — kiel gigantaj senflugilaj birdoj portantaj surdorse la homan Ĉagrenon....

Blankaj tendoj kuŝas antaŭ vi.
Odoras je bakita banano, je vino de ananaso kaj suko de kokosa lakto.

Nudaj knabinoj pasas kaj vento ventumas iliajn ruĝajn kufojn. Sur iliaj koloj sonoras kolĉenoj de

perlamoto, koralaj fingroj kaj lazurkoloraj perleroj.

Surŝultre ili portas kruĉojn da akvo.

Sur la sabla deklivo aperas longaj ombroj — ili kreskas kaj alproksimiĝas: denove venas karavano. Post horo tra la tendoj glitmoviĝos nekonataj homoj kaj la vilago fariĝos urbo.

Kaj morgaŭ matene neniu restos.

Vi venis — aŭdi fabelon de malproksimaj kamelitoj kaj kantojn de nudaj junulinoj.

Blankaj tendoj kuŝas antaŭ vi.

Animo via ekkantos kiel vento meze de la oazoj - kaj forgesos la mondon.

El tie ĉi vi revenos ĉe viaj proksimuloj - malĝoja kiel la kanto de araba ŝalmo.

Antaŭ vi bruetas rapidema torento.

Super la akvo kliniĝas nuda junulino: ŝi lavas sin, Sur la akvo ludas aroganta rebrilo.

Grizkoloraj purpuroj rompiĝas en la verdaj koloroj de la palma krono.

En la dezerto ne estas peko...

La junulino rigardas vin kaj ridas.

Ŝiaj dentoj estas blankaj kiel perlamoto kaj akraj kiel ĉe rabema besto. Senbrue paŝas ŝi kaj flekse, kiel tigrino.

Antaŭ vi bruetas klara torento.

La junulino mallevas buntan kufon kaj per ĝi ŝi elviŝas sian malsekan korpon. Sur ŝia brusto brilas gutoj da akvo...

Ŝi ĵetas surŝultren la kufon kaj foriras. La ruĝa silkajo estas malseka, - la kufo gluigas dorsflanke.

La paŝoj de la junulino lasas postsignojn en la malseka sablo.

Baldaŭe la akvo plenigos ilin - kaj estos nekonoble kiu trapasis ĉi tie.

Vi estas veninta - por sonĝi denove vian revon je malproksimaj landoj.

Blankaj tendoj kuŝas antaŭ vi.

Kaj via revo kreskas kiel aperaĵo meze de l' sabla senfineco: kvieta rideto de suna tago, — revo je

malproksimaj arbaroj, kiuj silentas, - revo je arbaroj, kiujn flamo cindrigis...

Blankaj tendoj kuŝas kiel mortvestoj antaŭ vi.

Animo via bruliĝos kiel papirusa branĉo, meze de l' dezerto — kaj malaperos de la mondo.

El ĉi tie vi revenos mortinta ĉe viaj proksimumoj: via mortinta animo kunmiksiĝos kun la mortaj fantomoj de la dezerto.

Via kanto estas plendsono de enterigita homo, kiun la Suno ĉirkaŭprenas.

El la „Sunaj fabeloj“ tradukis IV. SARAFOV.

^ACAGRENITA ESPERANTISTO

de HRIMA.

Du masonistoj inerte movis la martelojn sur la dikaj muroj de malkonstruata fortikaĵo. Iliaj figuroj kaŝiĝis en la abunda polvo. De tempo al tempo super la fortikaĵo traflugis cikonio, kiun postflugis aro da petolemaj paseroj.

La sireno aŭdigis sian voĉon. La du masonistoj, preskaŭ egalaĵaj, forlasis siajn respektivajn lokojn. Ilin imitis la ceteraj. Niaj herooj sin kaŝis sub ombron malvarman de nukсарbo kaj, lavinte la manojn, sidiĝis por tagmanĝi.

Post la tagmanĝo ili etendis sin sur la herbo kaj intencis dormi.

— He, vi parolas Esperanton? demandis la pliaĝeta masonisto, kiu havis la honoron porti la nomon Zagubena Stanka.

— Jes, - respondis, la plijuneta.

— Kredeble, ĉu mi povus ellerni ĝin?

— Kial ne. Mi momenton ne dubas, ke vi ne povas tion fari.

— Mi povos pli facile ellerni ĝin, ĉar mi sciovas la francan lingvon. Donu al mi iun lernolibron. Ĉu vi havas, he Kleĉka?

— Mi donos al vi respondis Kleĉka, kaj premante inter la dentoj cigaredingon, li elpoŝigis la monujon, elprenis kajereton kaj donis ĝin al Zagubena Stanka.

— Tio estas? Mi dankas.

— En tiu ĉi kajereto troviĝas la tuta Esperanta vortaro, la gramatiko kaj la afiksoj.

— He! — ekmiris fraŭlo Zagubena Stanka - Mi tuj ellernos ĝin. Vi vidus ke post du-tri tagoj mi babilos kun vi en pura Esperanto!

— Mi tre ĝojos—respondis nekredeme la junetulo metis la kapon sur la herbon kaj ekdormis. Super li murmuretis la verdaj folioj de l' ardo. Paca birdeto kviete ripozis sur branĉeto, observante la kuŝantajn homojn.

En la daŭro de tuta semajno Zagubena Stanka eligis siajn okulojn per la ŝlosilo, kaj malgraŭ tio li povis e-memori nenion. Tamen, li ne malkuraĝiĝis. Li aĉetis grandan verdan stelon kaj fiere portis ĝin. Foje li diris al sia amiko Kleĉka.

-- Hodiaŭ mi renkontis Esperantiston. Li vidis mian signon, sed li ne salutis min. Kial vi diras, ke ĉiu Esperantisto estas afabla?

— Nu, amiko, li eble pensis ke vi estas komencanto kaj pro tio li ne volis alparoli vin. Cetere, vi unua devis tion fari...

— Sed, mi ne scias kiel komenci...

— Diru al li: „Samideano, kiel vi fartas“.

— Samledekano, kele vi fartas?

— Sam-ide-an, ki-el vi tar-tas!

— Ho, jes! Jes! Mi komprenas. Hej, Esperanto por mi estas tre facila. Mi baldaŭ ellernos ĝin! - kaj li mem kredis siajn parolojn. - He, li daŭrigis paroli-ĉu vi scias, kiel la potencaj ŝtatoj ne enkondukas Esperanton? Car tiam ne okazados militoj!

Okupante sian laborlokon, li fervore martelis la brikojn. Se lin preterpasas Kleĉka, li demandis kun rideto.

— Senjore, kele vete fare?

Komence Kleĉka provis korekti lin, sed fine li konvinkiĝis, ke la poligloto Zagubena Stanka kiu scipovis turkan, grekan, germanan, serban, rumanan kaj francan lingvojn-neniam povos ellerni bone eĉ unu frazon. Pro tio li eltrovis taŭgan respondon. kiu ridigis lin, -kaj li sciis, ke la rido plilongigas la vivon. - li estas unu el tiuj kiuj deziris longe vivi. Ce tia demando Kleĉka respondis al la fanfaronulo:

— Me fete fare bone, kaj ve?

— Tre bone, senjore. Ha, facila Esperanto!

Foje la amiko Kleĉka rakontis al kunvenintaj Esperantistoj. Forlasinte la kunvenejon, la societanoj vidis la poligloton Zagubena Stanka. Li sidis antaŭ dolĉaĵejo ludante per rozario. Kleĉka ridande laŭte elvokis:

— Senjore, kele vete fare?

— Me fete fare bone, senjore! - venis basvoĉa respondo.

Depost tiu tago Zagubena Stanka estis salutata de Esperantistoj nur per »Senjore, kele vete fare«. Kontentega li respondadis »Me fete fare bone, kaj ve?«

— Gaja popolo estas la Esperantistoj - li pensis. — Jam de malproksime ili rekonas min kaj gaje salutas. Ĝentila, afabla popolo! Dimanĉe mi penos fari paroladeton dum ilia kunsido. Ili miros, ekscinte kiom rapide mi ellernis ilian lingvon. Ili ekstremos aŭdante miajn parolojn! Ho, ne ĉiu povas kiel mi studi

lingvojn, mi ja scipovas francan, turkan kaj aliajn modernajn idiomojn...

Kelkajn tagojn li preparis sin por la parolado. Ja tio okazos post la mortotago de doktoro Zamenhof! Laŭ sia propra gusto li elektis modelajn frazojn el lernolibroj, aranĝis ilin laŭ sia kaprica volo kaj ellernis ilin parkere deklami.

Dimanĉe matene li unua eniris la kunvenejon. Tie li trovis nur la prezidanton, de la loka Societo.

— Bon tenon, senjore! — li salutas.

— Bonan matenon, samideano! — Kaj ili interŝanĝis la frazojn, kies forĝinto estis Zagubena Stanka kaj Kleĉka.

Baldaŭ la ĉambron plenigis samideanoj. Tio tre ĝojigas Stankaon. Li parolados antaŭ multaj homoj, kiuj disportos famon pri li!

La prezidanto malfermis la kunvenon. Parolis multaj samideanoj pri diversaj temoj. Zagubena Stanka eksentis, ke jam estas tempo por agi. Li etendis la manon al la prezidanto, por peti la parolon. Ne facile li sukcesis tion atingi. Fine, la prezidanta moŝto faris al li tiun ĉi plezuron. Zagubena Stanka ektusis, ĉirkaŭrigardis, manfrotis la fruntan kaj, sentante la rigardojn de l' kunvenintoj sur siaj okuloj, ekparolis per vibranta voĉo:

— Afablaj amikoj mi voloj diroj kelkaj vortoj pri la Esperanto. Tiu ĉi homo volas paroli lingvon Esperanto, sed li ne povas. Feliĉa estas kiu parolas. Pli bone pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero! Mi aŭskultoj! Faciloj Esperantoj! Juna homo levas plenan sakon facile. Juna knabo legas libron atente! Lingvo internacia Esperanto estas bonea inkorporilo... Ne diru hop antaŭ ol salti... La inter..

Laŭtaj ĝojkrioj kaj aplaŭdoj ne permesis al li daŭrigi la paroladon. Li sidiĝis. Li diris ĉion kio premis lian koron. Li ĝojis, ĉar evidentiĝis, ke ĉiuj esperantistoj estis kontentaj. Ili ĉiuj korpskue ridis.

Ja la feliĉon sekvas malfeliĉo, li estis devigata forveturi dum la aŭtuno al Sofio kaj tie ekloĝi ĉe sia ĉefo. Li ne deziris disiĝi kun la lokaj Esperantistoj, kiuj estis tiom afablaj al li. Tamen Kleĉka certigis lin, ke ankaŭ en Sofio la Esperantistoj estas afablaj. Li eĉ certigis, ke tie ili estas tre multnombraj.

En la stacidoma bufedo la samideanoj aranĝis, okaze de lia forveturo, amuzvespereton. Tie ĉi li denove faris paroladon en la kara Esperanto.

La trajno forflugis kaj li ankoraŭ revis pri ĉio ĵus okazinta. Kiel agraba estis ĉio! Sed nun al nova vivo!

* * *

Oni enloĝigis lin en Poduene. Tiu ĉi antaŭurbo de Sofio tre malplaĉis al li — kotoza ĝi estas. Li revis loĝi en la centro de l' urbo, kie li esperis renkontadi pli ofte Esperantistojn kaj in-

terparoli kun ili, pri Esperanto, kiun lingvon li tiom ekŝatis. Estis malvarma, nubozaj tagoj. Vitoŝ dronis en griza nebulo. Tramveturiloj rapide ruliĝis tra la stratoj. Zagubena Stanka alveturis la placon Sveta Nedelja. Li ekpromenis laŭ strato Maria Luiza kaj malsatiĝinte, li eniris vegetaran restoracion. Longe li legis la manĝoliston kaj fine mendis legomaĝon. Kiom granda estis lia miro, vidinte en la plado nenian viandpecon. Kolerigita li vokis al si unu el la kelneroj, kiuj amase svarmis kaj indigne diris al li!

— Sinjoro, konsideru iomete, mi petas. Viaj servistoj formaniĝis ĉiujn viandpecojn!

— Mi petas, sinjoro, tio estas vegetara restoracio...

— Vegetara, kio do? Ĉu en la vegetaraj restoracioj la servistoj manĝas la viandpecojn? Min vi volas moki! Reprenu vian manĝaĝon! - kaj kolera li leviĝis, surmetis sian eluzitan surtuton kaj forlasis la manĝaĝon. Sur la strato li renkontis vendiston de buterpanetoj. Li aĉetis kelkajn kaj, promenante, satmaniĝis. Nur kolero premis lian koron - oni konsideris lin stultulo kaj donis al li manĝaĝon sed sen viando!... Subite lia kolero forvaporigis, kiel ankaŭ la nebulo de Vitoŝ. Renkonte al li marŝis homo kun verda stelo surbruste. La verdstelulo preterpasis lin senatente! Zagubena Stanka ekiris post li. Li nepre volis alparoli tiun ĉi Esperantiston. Kleĉka diris al li, ke en Sofio la Esperantistoj estas multaj kaj li renkontis ĝis nun nur unu! Nun li ne ellasos tiun ĉi.

Pli ol horon Zagubena Stanka postiris la Esperantiston kaj fine, ĉe Ŝaren Most, li sukcesis antaŭiri lin, rapide daŭrigis la iron al la stacidomo kaj subite ekiris returne. Nun li volis iri renkonte al la Esperantisto kaj diri al li per laŭta kaj fiera voĉo sian kutiman demandon faratan al renkontataj verdsteluloj.

La Esperantisto kvazaŭ intence evitis alparoli lin. Sed Zagubena Stanka ne ŝanĉeliĝis. Li alpaŝis la sinjoron kaj aŭdigis sian basan voĉon:

— Senjore, kele vete fare?

La sinjoro haltis, ekrigardis la grandegan stelon de Zagubena Stanka kaj, ridetinte maldolĉe, diris:

— Mi nenion komprenis. Vi idisto?

— Tjural mondoj privitato (salutojn de l' tutmondo) — daŭrigis „Esperante“ Zagubena Stanka.

— Mi ne komprenas vin, sinjoro - klarigis bulgarlingve la sinjoro.

— He, hometo, vi nun lernas Esperanton. Ankoraŭ multe vi devas lerni por povi interparoli kun mi — ĉagrenita diris Zagubena Stanka kaj forpasis.

— He pli forte ĉagrenita li pensis revenante al la urbocentro — tre prava estis mia amiko. Estonte ankaŭ mi promesas ne porti la verdan stelon, — por ke min ne alparolu tiaj balbutuloj, kiel la hodiaŭa, kiuj nur por fierigi portas la sanktan signon de l' Espero!

Plu ni ne rakontu pri Zagubena Stanka. Ni nur diru, ke li plenumis sian promeson.

NIGRA MARO 2)

Estis dirite, ke kvankam N. Maro havas la gloron de ŝtorma maro, tamen la manko de sablaĵoj, subakvaj rokoj kaj insuloj faras sendanĝera la navigadon. En efektiveco preter ĝiaj bordoj staras ĉirkaŭ 30 insuletoj, el kiuj 3 plej grandaj estas en fremda teritorio: Berezan, kontraŭ la Berezana golfo Serpenta Insuleto, kontraŭ la Sulina elfluejo de Danubo kaj Kefken — apud la Malgrandazia bordo. Preter la bulgara bordo kuŝas 5 malgrandaj rokaj insuletoj, el kiuj 4 estas ĉirkaŭ la suda rando de la golfo de Burgas kaj la kvina — pli sude, en la Kavak-golfeto. Iliaj nomoj estas: S-ta Anastasia, S-ta Ivan, S-ta Petr, S-ta Kirik kaj S-ta Todor. Sur S-ta Anastasia, kiu altiĝas 10 metrojn super la mara supraĵo, kaj estas ĉ. 5 km. oriente de la haveno de Burgas — en 1914. estis konstruita lumturo (apud la malnova de 1863.), kiu jetas konstantan blankan lumon je 20 km. Sur ĝi antaŭe ekzistis monaĥejo, en kies korto libere promenadis la maraj mevoj, amikece prizorgataj de la monaĥoj. Nun la monaĥejo estas ruinigita kaj la mevoj forlasis ĝiajn rubojn. Restis nur malgranda kapeleto, kiun prizorgas la lumturisto kaj lia edzino — la solaj loĝantoj de la insuleto. Lumturo konstruita en la sama jaro, lumanta la maron je 37 km estas same sur S-ta Ivan, insuleto 30 m. alta. Ĝi estas la plej granda el ĉiuj 5 insuletoj. Ĝia malnova lumturo estas de 1883. Sur Sta Kirik en bizantia epoko ekzistis reĝa kaj patriarka monaĥejo. Tiuj ĉi 3 insuletoj — S-ta Ivan, S-ta Petr kaj S-ta Kirik ŝirmas la Sozopol-golfeton de norde kaj nordoriente. La lasta, kvina insuleto S-ta Todor estas la plej malgranda kaj sur ĝi estas la ruinoj de malnova monaĥejo S-ta Todor, kiu donis la nomon al la insuleto. Ĝi staras gracie sur la blua akvo en la suda parto de la Kavaka golfeto.



La plej granda rivero, kiu enfluas Nigran Maron — estas Danubo. Per siaj tri kanaloj — 1. Kilikia (la norda, plej granda, portanta 63% el la akvo de Danubo kaj rapide fluanta), 2. Sulina (100-130 m. larĝa, arte pli-profundigita, pleje navigata, portanta 7% el la akvo), 3. S-ta Georgi (la suda portanta 30% el la akvo, ĉe la elfluejo malprofunda) — Danubo enportas en la maron sekunde 7,000 kub. m. da akvo meze, kaj ĉ. 60 milionojn da tunoj da aluvia materialo jare. Do ĉiujare estas kreata tera surfaco de 6 kv. km. kun dikeco de 10 m. Laŭ la vortoj de Elisée Reclus (»Universala

geografio“, rusa trad. 1876, vol. I. p. 163—164.) estas necesaj 6,000,000 da jaroj, por ke la tuta maro pleniĝu per tiu ĉi portata ŝlimo kaj sablo. Nia limado ĉe Danubo estas kun granda ekonomia graveco por ni. Ĝi estas la rekta vojo, kiu nin ligas kun centra Eŭropo. Per kanalo inter Danubo kaj Rhein oni povus veturi de la ĉedanubaj havenoj ĝis Rotterdam (Nederlando) laŭ akva vojo.

Aliaj grandaj riveroj kiuj enfluas N. Maron estas: Dnjestr, Bug-Dnjepr, Don (en Azovan Maron), Kuban, kiuj estas rusaj riveroj kaj ankaŭ kelkaj malpli grandaj, ekz. Kizil Jrmak, en Malgranda Azio.

Estas kelkaj riveretoj kiuj fluas en la maron en bulgara teritorio, el kiuj ĉefa estas Kamĉia, en malnova tempo nomata Panius. Ĝi havas proksime ĉe la maro profundon ĝis 5 m. sed ĝia buŝo estas sablofermita kaj malprofunda. Kanalgita kaj dragita ĝi povos havi certan gravecon en ekonomia rilato.

Preter la maro estas ankaŭ kelkaj lagoj, ekz. tiu ĉe Varna, ĉe Anhialo (kiu estas tre sala — 77% kaj servas por produktado de salo), Atanaskoj, Vajakjoj kaj Mandra, kiuj estas ĉirkaŭ Burgas. Crava por la industrio estas la sala lago ĉe Anhialo, el kiu en 1921 estis produktitaj 20 milionoj da kg. da salo.


Elirante el Varna per ŝipo, oni vidas dum helaj tagoj — fore sur la horizonto, etendanta sin profunde en la maran vaston — la kabon Kaliakra (S-ta Nikolao), kiu estas en rumana teritorio. Ĝi estas bela, 60—70 m. alta roko, sur kiu la despoto Dobrotiĉ fondis sian fortikaĵon Kalacerkă dum la fino de la XIV jc., kiu — kune kun aliaj fortikaĵoj, tiu sur promontoro Galata ĉe Varna, Kozjak kaj Emona — defendis la bordojn de pretermara Bulgario dum la fino de la dua Bulgara Regno. Strabon (historiisto, de 63. ant. Kr. ĝis 19. post Kr.) ĝin nomas Tirizis, rakontante ke jam en la komenco de IV jc. tiu ĉi kabo estis fortikaĵo, kie la reganto de pretermara Trakio — Lysimach kaŝis siajn trezorojn. Poste ĝi estis nomita Tetrisiada, Akra, kaj la nuna nomo aperis en la historio dum la mezepoko. Greke Kali-arka signifas „bela bordo“ aŭ „bela kabo“. La lumturo de Kaliakra lumigas la maron je distanco de 40 km. kaj servas kiel ĉefa punkto signalanta la vojon al la Danuba buŝo.

Galata, kiu limas desude la golfon de Varna kaj same havas lumturon; rivero Kamĉia, fluanta meze de la fama arbaro Longoz, kiu estas pitoreska angulo en nia lando; Emine (la ekstremo de la Balkano kiu atingas la maron); Mesemvria, pitoreska urbeto staranta sur negranda duoninsulo, kiun ligas kun la tero nur mallarĝa istmo, oportuna banloko, fama per siaj dunoj — unikaj sur nia bordo; Anhialo, urbeto fama pro la proksima salmarĉo; Burgas — granda komerca urbo en la fundo de la vasta golfo samnoma, konkuranto de Varna kiel haveno, kun tri grandaj lagoj en sia ĉirkaŭaĵo — Atanas, Vaja kaj Mandra, kaj nemalproksime la minerala banejo Lăgene; Sozopol, urbeto sur la bordo de samnoma golfeto, kie en la antikveco staris la fama Apolonia — havenurbo grava ĝis la epoko de Kristo; Zejtin - burĝin (turke — „Oliva kabo“); la Diabla golfeto; Port Viza, golfeto ĉe la buŝo de rivero Kara-Agaĉ; Vasiliko, Agatopol kaj Rézovo — la plej sudaj niaj golfetoj kun samnomaj vilaĝoj, post la lasta el kiuj pasas la bulgara — turka landlimo — jen estas la nomoj de interesaj lokoj kaj vidindaĵoj sur nia Nigramara bordo.

Por fini la priskribon de N. Maro preter la bulgara bordo, oni devas mencii la pli gravajn specojn de ĝia faŭno kaj floro. La faŭno — de la protozooj (Protozoa — първаци) ĝis la maraj mambestoj — enhavas pli ol 500 genojn. Karaktera estas la grupo de la mambestoj, prezentata de du familioj: Delfenidoj [Delphinidae — дельфини] kaj Fokidoj (Phocidae — тюлени). Estas du genoj de foko — blankventra foko (Monachus albiventer Bald. aŭ Pelagius monachus Cuv.) kaj ordinara foko (Phoca vitulina. — „N. Maro“ p. 50.), kiuj loĝas en la kavernoj de la roka promontoro Kaliakra, ĉe Mesemvria kaj Sozopola bordo, ĉe Oliva kabo, kaj en pli granda kvanto preter la Malgrandazia bordo. Ilia patrujo estas la Mediteranea maro kaj per la Marmora maro ili venas al niaj bordoj (— „La mambesta faŭno de Bulga

rio“ — V. T. Kovačev, 1925. p. 25 — laŭ tiu ĉi aŭtoro ekzistas nur la unua speco de foko — *Monachus albiventer*). La ĉemara loĝantaro nomas ilin per la komuna nomo „foka“ aŭ „mara urso“.

El la familio de la delfenoj ĉe ni estas konataj 3 genroj: Delfeno (*Delphinus delphis* Linn. — бѣлъ домузъ-балж, бѣлъ делфинъ) Tursiopso (*Tursiops tursio* Fabr. — черенъ домузъ-балж, черенъ делфинъ) kaj foko (Phocaena communis Cuv. — пѣхтунъ). La unua atingas longecon de 2 m., la dua — 3 m. kaj la tria — 150 ĝis 2 m („La mambesta faŭno“ — Kovačev, p. 8. — de 1.65 ĝis 1.98 m.). La popolo nomas la delfenojn per la iom nepoezia nomo „maraj porkoj“ aŭ plej ofte per la turka nomo „Domûz-balâ“ (per nova turka ortografio *Domus baliĝi* t. e. „pork-fiŝo“) Promenantoj per boato en la Varna golfo ofte povas observi la ludojn de la delfenoj, kiuj elsaltas super la akvon, turnas sin kaj desegnante duoncirklon per la nigra kornosimila dorsnaĝilo — dronas ree en la profundojn.



La ordon de la fiŝoj ĉefas la skvalo (akuĉo, bulgare — ŝarko), la mara pirato. En N. Maro vivas du genroj el la familio de la skvalo — la ordinara Nigramara skvalo (*Acanthias vulgaris* aŭ *Squalus acanthias* Lin.) nomata de la fiŝkaptistoj „mara hundo“ kaj la malgranda Egla (Blankmara) skvalo (*A. Blenvilli* aŭ

Squalus Blenvilli Riss) kiu nur unuope ennaĝas en N. Maron el Marmora maro. La unua atingas ĝis 1.20 m. kaj la dua ĝis 0.70 m. (Penčo Drenski — „La nigramara skvala *Acanthias vulgaris*“ rev. Lovec — „ĉasisto“ XXIX №3) La Nigramara skvalo povas tranaĝi dum unu horo 17 mejlojn t. e. 31 km.

(Daŭrigota.)

СВЕДЕНИЯ за КОНГРЕСИТЪ

1. НАЦИОНАЛНИЯТЪ ще се състои вмѣсто въ Ломъ — въ Видинъ на 28, 29 и 30 Юли н. г. Направени сж постѣпки за отпускъ на чиновницитѣ и за намаление по Б. Д. Ж. и по дунавскитѣ експресни параходи. Експресния параходъ трѣгва на 27 Юли (сѣбота): отъ Русе 2 ч. презъ ноцъта, отъ Свищовъ — 5 ч. 30 м., отъ Сомовитѣ — 8 ч. 45 м., отъ Орѣхово — 12 ч. 50 м., отъ Ломъ — 19 ч. 10 м. и пристига въ Видинъ на 21 ч и 50 минути. За Б. Д. Ж. — да се има предвидъ новото разписание. Конгресната такса е: 30 лв. за членове на Съюза и 50 лв. за нечленове — гости. Отъ значение е веднага да се попълнятъ „алиĝилој“ тѣ и да се изпратятъ на конгресния комитетъ, заедно съ конгресната такса. За предпочитание е да се пѣтува групово и съ знамена. За подробности да се слѣдятъ конгреснитѣ бюлетини. За да докажемъ нашата сила, сплотеностъ и значение трѣбва масово да посетимъ конгреса въ хубавия исторически крайдунавски Видинъ.

Всичко, отнасяще се до конгреса да се изпраща до:

ВЛАДИМИРЪ ЛАЗАРОВЪ, I СЖДИЯ ИЗПЪЛНИТЕЛЪ — гр. ВИДИНЪ.

2. МЕЖДУНАРОДНИЯТЪ. Да се има предвидъ, че за пътуване съ общия паспортъ е необходимо САМО ЧЛЕНСТВО КЪМЪ СЪЮЗА (посрѣдствомъ мѣстнитѣ дружества или сборната група), ПРИТЕЖАВАНЕ УВЕРЕНИЕ (вижъ брой 8 т. г. стр. 126 отъ „В. Е.“) и ПОДЧИНЕНИЕ НА РЖКОВОДИТЕЛЯ. ОТЪ ДРУГО СЪЮЗА НЕ СЕ ИНТЕРЕСУВА И НЕ ЗАДЪЛЖАВА.

Съобщаването за участие и записване въ общия паспортъ се продължава до 15 ЮНИ — ТОВА Е ПОСЛЕДНИЯ СРОКЪ. Който ще пътува съ общия паспортъ да съобщи това до тази дата, като изпрати 320 лв., заедно съ три портретчета и да извести где иска да квартирува въ Будапеща (хотелъ, пансионъ и пр...) Препоръчително е образуването групи (2-3-4 души) зв квартируване. Така ще бжде и по-ефтно. Тръгването ще стане отъ Видинъ веднага следъ закриването на нашия конгресъ — на 30 юли. Парахода тръгва отъ Видинъ на 21 часа и 55 минути. Онези които нѣма да присъствуватъ на нашия, но ще пътуватъ за Будапеща трѣбва да бждатъ въ Видинъ на 30 юли (вторникъ) къмъ 16 часа, най-късно. Въ Будапеща ще се пристигне на 2 августъ (петъкъ) къмъ 13 ч. и 30 м.. Които биха желали да посетятъ слѣдконгреса въ Чехословакия (вижъ брой 8 стр. 127 на „В. Е.“) съ връщане прѣзъ Виена по Дунава — да съобщатъ това. Въ зависимостъ отъ числото на желающитѣ и възможността ще се направи необходимото за снабдяване тази група съ отделенъ общъ паспортъ. Въ Будапеща ще се стои вѣроятно най-много десетъ дни. За отиване и връщане сж необходими $4\frac{1}{2}$ дни. Тѣй че всичко ще сж необходими около 15 дни. Да не се забравя снабдяването съ национални костюми и знамена, съгласно даденитѣ вече по преди нареждания въ тая смисълъ. Остава още малко врѣме — нека още отъ сега се подготвимъ.

Съидейника Ст. Минковъ, завърналъ се преди нѣколко дни отъ Будапеща, е много доволенъ отъ приема, проявенъ отъ съидейницитѣ тамъ. Той твърди, че тези които ще посетятъ Будапеща ще намерятъ голѣма подкрепа и топълъ приемъ отъ тамкашнитѣ наши съидейници и препоръчва масово посещение на конгреса.

Впрочемъ, гответе се да посетите международния конгресъ и да се насладите отъ царицата на Дунава — Будапеща отъ нейната красота, блѣсъкъ, всестранна култура и... отъ прочутата, пленяваща циганска музика.

Капитанъ СТ. РАДЕВЪ

Секретаръ на Съюза.

ЗА ПОДВИЖНАТА ИЗЛОЖБА

За да се реализира намерението на Ц. К. за такава една изложба умоляватъ се всички дружества и отдѣлни есперантисти да изпратятъ въ Съюза: литература, търговски и други афиши, проспекти, каталози, картички и пр. Нека всѣки, кой колкото може да отдѣли — да изпрати нѣщо за изложбата, предназначението на която е да ползва всички по пжтя на пропагандата. И изпращането на материалитѣ за изложбата да стане веднага, безъ отлагане, за да може най-сетне, да се осъществи тази идея и първото ѝ използване да стане отъ конгр. комитетъ въ Видинъ.

Използването на изложбата ще става по специаленъ правилникъ, който въ последствие ще се съобщи.

Първата работа е — да се получатъ въ Съюза колкото се може по-вече пропагандични материали.

Нека чрезъ тая подвижна изложба доразвиемъ вѣрата у обществото въ практическото приложение на езика.

DANKO. Stefan Miukov je la nomo de siaj kolegoj kaj siaj lernantoj esprimas siajn dankojn tutekorajn al la Budapestaj samideanoj pri la helpo, kiun ili donis al ili dum ilia vizito en Budapest.

Dank' al niaj samideanoj dum la foiro ili pasigis tre agrable kaj ili estis sufiĉe bone helpataj dum 5 tagoj.

Mortis nia s-no Ivan P. Apostolov el vilaĝo Polski Trâmbeș (Tirnova regiono).

Kongresglumarkoj

De la 16-a kongreso en VIDIN jus aperis. Belaspektaj koloraj kun la Biedo de «Baba Vida» fortikaĵo.

Nepre uzu en via korespondado.

Mendu tuj ĉe Dimitr Ivanov, 28 »Prista« Ruse. **100 pecoj 25 lv. inklusive la sendkosto.**

ABONPREZO:

por Bulgarujo — 30 leva

Por Eksterlando-2 sv. fr. Aparta n-ro 4 leva

ANONCPREZO:

Komercanoncoj-2 lv. kv. cm.; koresponda-10 lv.

ADRESO:

Redaktejo kaj Admistrejo str. „P. Maglov“ 4
RUSE telefono 553.

Redaktoro: IVAN KOTOV,

Presejo D. PETROV — Ruse.

РАВНОСМЪТКА

За прихода-разходигѣ на Сѣюза отъ 1 VIII 1928 година до 30 Апрельъ 1929 год, включително.

ПРИХОДЪ

1. Отъ чл. вн.	5978.— л.
2. Отъ стоки	4354.40 л.
3. „В. Esperantisto“	18525.— л.
4. Зел. седмица	290.— л.
5. К. Р.	1600.— л.
6. Дебитори	166.— л.
7. Непредвидени	24919.50 л.
<hr/>	
Всичко	55832.90 л.

РАЗХОДЪ:

1. „В. Esperantisto“	16636.— л.
2. Зел. седмица	290.— л.
3. К. Р.	— — „
4. Кредитори	6023.50 л.
5. Непредвидени	12094.— л.
6. Наемъ канцел.	4100.— л.
7. Канц. разходи	5838.80 л.
8. Заплати	6300.— л.
9. Осветл. и отопл.	1000.— л.
<hr/>	
Всичко	52313.30 л.

Наличностъ къмъ 1 Май 1929 г. 3519.60 лв.

Забележка: За презъ месецъ Май ще сж необходими. 2300 лв. за „В Esp.“; 600 лв. за наемъ; 900 лв. за заплата; поне 2000 лв. за канц. разноски и 1600 лв. за К Р — значи всичко необходимо около 5600 лв., а се има въ наличностъ само 3519.60 лв. Да се допустне, че за Май ще се намери начина, но.... послѣ?

Заклучението е: да се изпрацатъ членски вноски, записване абонати, да се не забравя фондъ „Savo“.

GESAMIDEANOJ!

Jus aperis la „Albumo de bulgaraj geesperantistoj“ jaro 1929, formato 25/16, 146 p., ampleksanta ĉirkaŭ 400 fot-kliŝojn de gesamideanoj, multaj vidindaĵoj el Bulgarujo bildoj de esp. kongresoj enlandaj kaj unu landkarton de Bulgarujo en Esperanto.

Vera esperanta ornamaĵo. Denacinda rememoro

Vendoprezo por enlando, kaj eksterlando:

Luksega eldono—120 levoj, 5 sv. fr., 4 R. M., 32 kr. ĉ.

Luksa eldono - 100 levoj, 4.5 sk. fr., 3.5 R.M., 27 kr. ĉ.

Ordinara eldono - 80lv., 3.25 sv. fr., 2.50 R.M., 23 kr. ĉ.

La prezojn inkluzivas la send-kostoj:

Mendu ĉe B. OKTOMVRIJSKI Rus., str. Knja ĵeska 33.

Vendo en kontanto.